

# *Ora Ĵurnalo*

Numero 27, Marto 2020



*Al la tuta mondo:*

**Bonvenon al la verda Gotenburgo!**

*Bonvolu viziti nian retpaĝon:*

**[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)**

## Enhavo

Enhavo .....	2	Vestarkoj .....	14
Pri Ora Ĵurnalo .....	2	Fama arkitekto en Gotenburgo – urbo en la okcidento .....	16
Espe-Porko meditas – kaj Andreas prelegas ..3		Kantoro Gunilla – Kantor Gunilla .....	18
Med Duolingo kan du lĉra dig esperanto .....	4	Hemsystem – ett jobb med gamla anor .....	21
El la biblioteko en Stannum .....	5	Ĝardenisto, preskaŭ la tutan vivon .....	24
Esperantoförlagets svenska kunder .....	6	”Elektristo” – de Lasse Granat .....	26
La monedoj .....	7	Unuoj kaj nuloj – mia granda intereso! .....	28
Sinjoro Monedo .....	7	Laboroj por pensiuloj .....	34
Jan Hellström fotis glacimevon kaj kormoranon .....	8	Framasonoj en Gotenburgo .....	35
Nova scienca kanalo en Esperanto .....	8	Laboru ne tro, sed lagome .....	36
El la retrevuo Penseo .....	9	Internacia Literatura Esperanta Konkurso... 37	
La nombro de laborperejoj malkreskos .....	10	Konkurso pri poezio .....	37
Kiaj profesioj estos dezirataj en la estonteco en okcidenta Svedio .....	10	U-talk: Learn Esperanto .....	39
La Internacia kaj La Fil’ de labor’ .....	12	Memorigo: kursaro 17–25 aprilo kun 4 Esp-kursoj kaj KER-ekzamenoj .....	39
Iomete pri SAT .....	13	Att arbeta som dövblindkonsulent i början av 90-talet .....	40
Sendi petskribon por ricevi laboron .....	14		

## Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantolibrejon en Stannum, Östadsvägen 68. Monapogoj estas tre bonvenaj al nia pg-konto 436 12-1.


Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79,  
siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat,  
073-502 53 32, ingeGERD.granat@telia.com.  
Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström,  
arendsian@hotmail.com.

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!





## Espe-Porko meditas – kaj Andreas prelegas



Saluton Printempo venas... malgraŭ la kronviruso.

- ☆ Sur la unua paĝo vi trovas bildon pri la placo de Olof Palme.
- ☆ Por varbi junulojn hungara gazeto montris la jenan tekston: **Ne Lernu esperanton se vi .....** (sekvis multaj ekzemploj) ..... Se vi malgraŭ tio deziras lerni Esperanton, turnu vin al la Esperanto-Societo de ..... Lenke Szasz sendis ĝin al mi. Eble ĝi funkcias en Svedio. Spektu la proponon sur la sekvanta paĝo! La kulturoj de Hungario kaj Svedio disas, kaj mi mallongigis la tekston.
- ☆ Tamen – **ESPERANTOSABATOJ nuligitaj en Gotenburgo**. Por malhelpi eventualan disvastigon de la korona-viruso ni devas nuligi la Esperantosabatojn en aprilo kaj majo. Ni revenos kun pli da informoj, kiam ni scios kiel ĉio evoluigos.
- ☆ Ĉi tiu numero ĉefe **temas pri diversaj profesioj**.
- ☆ Tiuj, kiuj aktivas en la labormarkato devas scii ke "lagome" estas bona. En Japanio oftas ke la pluslaboro semajne povas superi po 60 horojn. Terure! Ili kreis novan vorton por morto pro tro da

laboro: Karoshi/karoŝi. Tio signifas ke oni mortas pro tro da laboro. La japana vorto karojisatsu signifas ke oni faras memmortigon pro tro da laboro. Do, lernu labori lagome – ne tro multe, ne tro malmulte!

- ☆ **La Tago de virinoj** estas celebrata diversloke. La situacio de virinoj povas esti malbona. En Meksiko oni manifestas por informi ke po 10 virinoj tage estas mortigitaj de viroj, ne malofte de siaj propraj edzoj. Nekredeble terure! Eble la prezidento en Meksiko finfine reagos.
- ☆ **La SAT-organizo** (Sennacia Asocio Tutmonda) havas "La internacian" kiel batalkanton. Ĉu UEA (Universala Esperanto-Asocio) havas batalkanton? Tiukaze – kiun? La kanto "La Espero" estas ja por ĉiuj.
- ☆ Dum la Esperanto-Sabato, la 7an de marto **Andreas rakontis pri Aira Kankunen**, antaŭa membro de la Esperanto-Societo de Gotenburgo, kiu forpasis en la jaro 2010. Kaarlo Voionmaa, kiu kunestis, miris pro la kapablo de Andreas rakonti pri libro de Aira, skribita en la finna. Jen bildoj de la Esperanto-Sabato. /Siv




# Med Duolingo kan du lära dig esperanto

Sedan kan du skaffa adressboken Pasporta Servo, åka jorden runt och träffa esperantotalande i mer än 70 olika länder.



Esperanto är Duolingos mest regelbundna och därför relativt lättlärd språk.

*Lenke el Rumanio sendis inspiran artikoleon el hungara gazeto. Mi prenis kelkajn liniojn el ĝi:*



## Du ska INTE lära dig esperanto

- ☆ om du inte har tid
- ☆ om du inte har energi
- ☆ om du inte är intresserad av kulturer i andra länder
- ☆ om du tycker att världens språk behandlas rättvist
- ☆ om du inte tycker att vi behöver ett smart, politiskt neutralt, "Allas Andra Språk" – ett rättvist Fredsspråk.

## Vi NE lernu Esperanton

- ☆ se vi ne havas tempon
- ☆ se vi ne havas energion
- ☆ se vi ne interesiĝas pri kulturoj en aliaj landoj
- ☆ se vi pensas ke la mondaj lingvoj estas juste traktataj
- ☆ se vi ne pensas ke ni bezonas lertan, politike neŭtralan lingvon, Ĉies Dua Lingvo" – egalan Pacan Lingvon.

Om du trots allt vill satsa på Esperanto är du välkommen att höra av dig till Göteborgs Esperantoförening [gbg@esperanto.se](mailto:gbg@esperanto.se) så kan vi ordna en träff (när coronasmittan är under kontroll). Titta gärna på vår hemsida [www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)! Där hittar du också vår kostnadsfria nättidning Ora Ĵurnalo. Många artiklar är både på svenska och

esperanto. Du blir förvånad över hur mycket du redan förstår!


... Men... börja redan nu med Duolingo – så kanske du kan hoppa in i fortsättningskursen om du kommer till sommarkursen i Göteborg 22–26 juni 2020.

\*\*\*\*\*



Söker man på Pixabay på ordet Corona får man t.ex. denna vackra bild till vänster – en kokosnöt. Googlar man på Covid 19 eller Corona kan man få den högra bilden – också vacker – men oönskad.

Använd oväntad ledighet till att lära dig ett språk! 20 miljoner finns redan på Duolingo. Ingen smittspridning där! /Siv



# El la biblioteko en Stannum

## ”Lingvo Internacia” – monata revuo. Marto 1896.



### Esperantistaj vojaĝoj

[...] **S-ro V. Langlet** el Uppsala per scienca laboro veturis Firenson (Italujo) en komenco de Junio. En la vojo li vizitis Rusujon, precipe Petersburgon, Moskvon, Niĝnin, kaj eble ankaŭ Boriglebsk; s-ro Kazi-Girej nome havis la bonecon kore inviti al si ĉiujn Upsalajn esperantistojn, kiuj deziras viziti lin, kaj tiun ĉi ĝentilan inviton akceptos, se la tempo permesos, s-ro Langlet kaj Varsovion, al s-ro Wasniewski, kaj poste Buda-Peston kaj Italujon, – penante en ĉiuj lokoj konatiĝi kun la lokaj esperantistoj kaj fari novajn praktikajn spertojn de nia lingvo.

Ni vidas, ke la ekzemplo, donita en la pasinta somero de s-oj L. kaj E. Etzel ne restis sen sekvo. Ni ne dubas ke tielaj vojaĝoj estas inter la plej fruktoportaj manieroj de propagando.

\*\*\*\*\*

Eliris el la presejo 8-paĝa broŝureto  
”Literaturo de la lingvo Esperanto, ĝis 1:a  
Marto 1896”, eldonita de la Klubo

Esperantista en Uppsala. La verketo, kiu  
kostas 5 centimojn, estas ricevebla de l’  
eldonantoj kaj de d:ro L. Zamenhof, Grodno.

\*\*\*\*\*

Esperantistojn, kiuj deziras korespondadi, mi  
petas skribi al

**s-ro A. Mittelstaedt, Riga** (Rusujo), LKibauer  
Str. N:o 3.

\*\*\*\*\*

Mi deziras korespondi en Esperanto kun  
amikoj de nia lingvo. V. Fedorovskij, Moskvo,

Rusujo, Chistije prudi, Milnikov pereulok, d.  
Korovina, loĝ. N:o 21.

---

*La vespero estas pli saĝa ol la mateno – finna proverbo*

# Esperantoförlagets svenska kunder

**Roger Nilsson**, kassör för Esperantoförlaget:

Jag tog alla kunder i vårt kundregister med svenska adresser och kollade postorten och i

vilket län postorten var belägen. Här är resultatet:

Län	Antal kunder	Antal invånare	Antal kunder per miljon invånare
Blekinge	0	160 000	0,0
Dalarna	3	290 000	10,3
Gotland	0	60 000	0,0
Gävleborg	3	290 000	10,3
Halland	0	340 000	0,0
Jämtland	3	135 000	22,2
Jönköping	3	370 000	8,1
Kalmar	3	250 000	12,0
Kronoberg	0	210 000	0,0
Norrbottn	1	260 000	3,8
Skåne	10	1 400 000	7,1
Stockholm	9	2 400 000	3,8
Södermanland	1	300 000	3,3
Uppsala	11	390 000	28,2
Värmland	4	290 000	13,8
Västerbotten	1	280 000	3,6
Västernorrland	6	250 000	24,0
Västmanland	2	280 000	7,1
Västra Götaland	18	1 800 000	10,0
Örebro	2	310 000	6,5
Östergötland	2	470 000	4,3
<b>Summa</b>	<b>82</b>	<b>10 535 000</b>	<b>7,8</b>

Som postort är Uppsala mest frekvent med 9, Lund har 6, därefter Stockholm, Sundsvall, Gråbo och Göteborg med 3. (Invånarantalet i tabellen är avrundade, så summan av

invånare i Sverige kan skilja sig (något) från den officiella siffran.)

Dessutom har vi ju en del utländska kunder, t.ex. Brasilien och Australien.

# La monedoj

## ”Corvus monedula”



La monedoj estas kune kun la nucifragoj la plej malgrandaj inter la korvedoj. La monedoj estas ankaŭ tre sociaj kaj havas similajn regulojn kiajn homoj havas. Ili formas paron kaj vivas kune la tutan vivon.

Se unu en la paro mortus la restanta birdo vivas sola kaj funebros dum la restonta vivo. En la vintro la monedoj vivas en grandaj grupoj. La birdoj estas fluparolaj kun sia ”kjae”, ”ĉak”, aŭ ”kè”. Multe da homoj havas scion pri la inteligentaj kaj helpemaj birdoj, inter alie mia edzo.

Foje, kiam la kameno fumis en la domo, li kaj amiko grimpis supren sur la tegmenton per ŝtupetaro. Ili havis fasketojn kaj ŝovelilojn kaj rigardis malsupren en la kamenotubo. Subite nigriĝis. La tuta ĉielo estis plena de nigraj birdoj de ĉiuj mondflankoj. La monedo, kiu loĝis en la kamentubo, alvokis monedojn el

grandaj aroj kaj ili venis por protekti la monedojn en la kamentubo.

La du viroj sur la tegmento rapide revenis malsupren kun granda respekto.

”La monedojn neniu havas la rajton ĉagreni”

*/Ingegerd*

## Sinjoro Monedo

Kiu vi estas, sinjoro Monedo?

Kion vi volas mangi,  
kune kun sinjorino?

Ĉu ŝi estis morta, ho ve?

Kia estas via kompleto,  
nigra kiel nokto?

Kie vi sidas, sinjoro Monedo?

Ĉu, sur bruna barilo?

Kies barilo?

Ĉu estas la barilo de onklino Korniko?

Kiel vi venas, per flugiloj plumplenaj?

Kiom da amikoj sekvis vin?

Kial vi sidas sur bruna barilo sola?


Kompatinda sinjoro Monedo!

Venu, venu en neston molan, se vi estas sola,  
kompatinda, sinjoro Monedo! */Ingegerd*



*Pentraĵo pri monedo en la hejmo de Aino Åberg.*

# Jan Hellström fotis glacimevon kaj kormoranon



## Vittrut (glacimevo), en sällsynt gäst i Göteborgs Fiskhamn.

Denna vinter har vi haft besök i fiskhamnen av en vittrut (född förra året). Det var flera år sedan vi senast hade besök i Göteborg av denna art. Den häckar i arktiska områden på norra halvklotet. Övervintrar årligen sparsamt i Sverige. Bilden visar vittruten till vänster och en storskarv (grand kormorano) till höger.

## Glacimevo, malofta gasto en la Fiŝhaveno de Gotenburgo.

Ĉi tiu vintro ni havis viziton en la fiŝhaveno de glacimevo (naskita la pasintan jaron). Pasis multaj jaroj de kiam ni lasttempe havis viziton de tiu specio. Ĝi kovas idojn en arktaj areoj sur la norda duonglobo. Travintras ĉiujare malabunde en Svedio. La bildo montras la glacimevon maldekstre kaj grandan kormoranon dekstre.

## Nova scienca kanalo en Esperanto

Ĝuu facilan sciencon informon pri planedoj en klare elparolata Esperanto de D-ro Loĉjo de Nederlando:

<https://www.youtube.com/watch?v=a7z8zGqL3zl>







# PENSEO

*N-ro 341*

*mar. / 2020*

**Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994**

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 31-a jaro <http://www.eterno.cn/penseo/penlisto.htm>

## **El la retrevuo Penseo, eldonita de Veido, Ĉinio, marto 2020. Ĉiam kontribuoj el pluraj landoj.**

### **MARTE de "Eto" (Ĉinio)**

Jen alvenas malrapide l' primavero,  
kun viveco kaj la vervo de naturo.  
Varma spir' leĝere ŝvebas en aero,  
oni kaptas jam la senton de plezuro.

Herboj velkaj nun verdiĝas kun espero,  
florburĝonoj ŝvelas en zefira lulo,  
birdaj ĉirpoj klaras, molas kun tenero,  
kaj insektoj trilas salte en susuro.

Persikfloroj ĵus ruĝiĝas en ventpelo,  
jam invitas papiliojn al danc-balo,  
kaj abelojn al farado de miel'.

Arboj strebas al ombriĉa la vualo,  
la folioj pligrandiĝas en sunhelo,  
kontraŭ l' suno ŝirmos homojn sur trotuaro.

### **SONĜO de Siv Burell (Svedio)**

lun nokton dum la dorm'  
iras mi per milda vent'  
al lando kun alia norm'  
ol kutima vivevent'.

– Nur pensu,  
kaj konstruiĝas dom'!  
diras min la sonĝa hom'.  
– Senlima estas vi, kiel mi!

Amikojn mi renkontis  
kaj urbojn ili montris  
kun bibliotekoj, koncertejoj,  
parkoj kaj banejoj.

Mi ĝuis la kuneston  
ĝojan, karan feston!  
Resti tie volis mi  
en bela sonĝosfer'.

Sed taskojn havas mi  
sur nia propra ter'.  
La sonĝo donas eblecon  
esplori la teran belecon.

### **Maria Nazaré Laroca (Brazilo)**

#### **PROTAGONISMO**

"Ekzistado estas akto. Korpo – vestaĵo.  
Jarcento – tago."

(El: Nia hejmo. Francisco C. Xavier \_ Andreo  
Ludoviko)

"Ekzistado estas ago",  
en sanskrito: karmo.  
Ni estas neĉefaj roluloj  
en teatraĵo, kiu ripetiĝas  
eternece, serĉantaj  
ĉiam la ĉefan rolon  
por bono aŭ malbono.

Ostaĝoj de l' sortoŝanĝoj  
de sinsekvaj vivoj,  
ni nur estos liberaj,  
kiam ni ĉesos  
ami nur tion,  
en la aliulo,  
kio kuŝos en ni.

*Juiz de Fora, 1<sup>o</sup>/02/2020*

# La nombro de laborperejoj malkreskos

Kritiko kontraŭ la laborperadaj oficejoj igis la politikistojn pliefektivigi la labormanierojn.

La plano estas likvidi 132 laboroficejojn en la tuta lando. Venontan novjaron la laborperado nur havos proprajn oficejojn en 100 el 290 komunumoj.

Sed la ministro pri la labormerkato, Eva Nordmark (el la socialdemokrata partio), estas kontenta, kaj ŝi fieras pri la maniero kiel la laborperado "ekluktas" kun la taskoj, kiujn la registaro donis la pasintan novjaron.

La popola kritiko estis granda kaj nun oni 'paŭzas' la likvidadon iomete. Sed per kunlaboro kun la komunumoj kaj pli da teknikaj solvoj, la labormerkato pli bone funkcios – laŭ la politikistoj. Privataj entreprenoj transprenos multon de la laborperado.



La ministro pri la labormerkato Eva Nordmark.

FOTO: CLAUDIO BRESCIANI/TT

Ŝanĝoj en la laborvivo ĉiam okazas, ĉar novaj tempoj postulas novajn labormanierojn. La ŝanĝoj venas malrapide aŭ rapide. Unue estas ĥaoso, sed pli kaj pli novaj taskoj iĝas rutinoj.

La dungitoj en la laborperejoj verŝajne ne havos problemojn trovi novajn laborojn. Multaj jam havas novajn postenojn, ofte en la komunumoj. /Siv Burell

## Kiaj profesioj estos dezirataj en la estonteco en okcidenta Svedio, laŭ artikolo en Göteborgs-Posten



La komuna trajto estas ke oni bezonas postgimnazian edukadon por havi tiajn dungojn.

Bildo de Pixabay

Bistandsbedömare	Laboras en komunumoj kaj esploras la apogbezonojn de maljunuloj kaj personoj kun funkcionariecoj.
Civilingenjör	Laboras i.a, por konstrui domojn, pontojn aŭ evoluigi novajn manierojn komuniki.
Förskollärare	Respondecas pri lernado kaj evoluo de la pli junaj infanoj.
Sjuksköterskor, specialistjsjuksköterskor, undersköterskor	Manko de flegistinoj, specialistaj flegistinoj kaj asistantaj flegistinoj.
Tandhygienist	Denthigienistoj laboras preventive per forigo de tartro kaj poluras dentojn. Ili ankaŭ konsilas pri denthigieno.
Ingenjör och tekniker	Ingeniero kaj teknikisto troviĝas en multaj branĉoj: konstruado, elektriĉo, programado, konstruado, produktado, evoluado de produktoj.
IT-specialister	Specialistoj, kiuj respondecas pri la realigo de la komputila reto, la TTT-ejo.
Lärare	Instruistoj. Konstanta manko de instruistoj en ĉiuspecaj lernejoj.
Veterinär	Veterinaro. La nombro de dombestoj en Svedio kreskas kaj ili bezonas flegadon.
Anläggningsarbetare	Laboristoj, kiuj fosadas, faras ŝton-pavimadojn, konstruas murojn, altanojn, ŝtuparojn k.t.p.
Buss- och spårvagnsförare	Kondukistoj de busoj kaj tramoj. Kiam la aŭtoj malkreskas en la urboj, oni bezonas pliajn busojn kaj tramojn.
Elektriker	Elektristoj havas bonan labormerkaton.
Förare av jordbruks- och skogsmaskiner	Kondukistoj de agrar- kaj arbar-maŝinoj.
Kockar	Kuiristoj laboras en hoteloj, restoracioj, hospitaloj, maljunulejoj k.t.p.
Lastbilschaufför	Kamionaj ŝoforoj. Granda manko en okcidenta Svedio.
Process- och maskinoperatör	Procesa kaj maŝina operatoro. Delonge granda manko.
Plåtslagare	Ladistoj. Tiu profesio estas survoje foriĝi laŭ Göteborgs-Posten (?)
Slaktare	Buĉistoj. Mankas kompetentaj buĉistoj.

---

*Pro la floro ankaŭ la poto estas akvumita – greka proverbo*

# La Internacia kaj La Fil' de labor'

## Internationalen och Arbetets söner

### Interreta informo:

"La Internacia" estas verkita de Eugène Pottier en 1871 lige al la falo de la Pariz-komunumo. La muzikon komponis Pierre Degeyter en 1888. La traduko en la svedan estas farita de Henrik Menander en 1902. Interese estas ke Henrik Menander neniam tradukis la kvinan strofon. Hjalmar Branting, ĉefministro, opiniis, ke ĝi estas maldeca, verŝajne kaŭze de la diskuto malligi la union kun Norvegio.

En la Labormovado je kunvenoj ekis kantkonkursoj. Simple oni provis supersoni unu la alian.

La revoluciema parto kantis "La Internacian". La reformistoj kantis "La fil' de l' labor'". Iom post iom "La Internacia" fariĝis la batalkanto de la tuta labormovado.

### Information från nätet:

Internationalen skrevs av Eugène Pottier år 1871 i samband med pariskommunens fall. Musiken komponerade Pierre Degeyter 1888. Översättningen till svenska gjordes av Henrik Menander 1902. Intressant är att Henrik Menander aldrig översatte den femte versen. Hjalmar Branting, statsministern, ansåg, att den var olämplig, förmodligen p.g.a. diskussionerna om att upplösa unionen med Norge.

I arbetarrörelsen uppstod vid möten sångtävlingar. Man försökte helt enkelt överrösta varandra.

Den revolutionära delen sjöng "Internationalen". Reformisterna sjöng "Arbetets söner".

Så småningom blev Internationalen hela arbetarrörelsens kampsång.



Kiu pentris la bildon? Interrete nur estas skribite, ke kantas sveda ĥoro:

<https://www.youtube.com/watch?v=MVr0A1bGRkk>

### INTERNATIONALEN

Upp trälär uti alla stater,  
som hungern bojar lagt uppå.  
Det dånar uti rättens krater,  
snart skall utbrottets timma slå.  
Störtas skall det gamla snart i gruset.  
Slav stig upp för att slå dig fri.  
Från mörkret stiga vi mot ljuset,  
från intet allt vi vilja bli.

**Upp till kamp emot kvalen!  
Sista striden det är,  
ty Internationalen  
åt alla lycka bär.**

### LA INTERNACIO

Leviĝu, proletar' de l' tero  
leviĝu, sklavoĵ de malsat'!  
La Vero tondras en kratero,  
sekvos finofara bat'.  
La paseon plene ni forviŝos  
amasoj, marŝu, kresku ni!  
La mond' en fundament' ŝanĝiĝos,  
ne nul' sed ĉio estu ni!

**Por batal', por la lasta  
unuiĝu nia front'  
internacia estos  
la tuta homa mond'!**

## Iomete pri SAT

**SAT = Sennacieca Asocio Tutmonda har sitt  
huvudkontor på denna adress:**

67 av. Gambetta  
FR – 75020 Paris

En 1922 aperis unuafoje la Jarlibro,  
enhavante la adresojn de ĉiuj membroj.

1. Esperanto por laboristoj ne estas celo,  
sed rimedo;
2. tial la laboristaj esperantistoj devas  
organizi sin tute memstare;
3. necesas ne nur propagandi, sed ankaŭ  
uzi, apliki la lingvon.

**SAT celas helpi al progresemluloj tra la  
mondo**


- interkompreniĝi,
- informiĝi,
- kleriĝi,
- plibonigi la vivon,
- interrilati por agadi kontraŭ subpremo  
ktp.

**SAT uzas racie elpensitan lingvon por atingi  
siajn celojn: **ESPERANTO**.**

La 93a kongreso de SAT okazos en Bjalistoko  
inter la 25a de julio kaj la unua de aŭgusto  
2020.



# Sendi petskribon por ricevi laboron



## Ekzemplo de persona letero – vendisto en vestovendejo.

Saluton,

Mi vidis de via anonco, ke vi serĉas vendiston por via butiko, kaj sentas ke tio estas la ĝusta laboro por mi. Mi havas iomete da sperto pri vestoj/konfekcio sed ankaŭ de aliaj branĉoj, elektroniko kaj ĉiutagaj bezonaĵoj.

Mi translokiĝis al X-urbo antaŭ unu jaro por finfari miajn studojn pri ekonomio kaj merkato, kiuj finiĝos post du semajnoj. Flanke de la studoj mi – ĉefe semajnfine – laboris por havi kontakton kun la ekonomia vivo. Ĉar homoj interesas min, mi facile havas kontakton kun klientoj. Post unu jaro en

Francio, mi sufiĉe bone regas la francan flanke de la angla.

Kiam mi ne studas, mi interrilatas kun miaj geamikoj, butikumas kaj legas diversajn magazinojn, volonte pri modo kaj dezajno.

Mi aldonas miajn atestojn kaj notojn kaj antaŭvidas renkonti vin.

Kun afablaj salutoj!

Nomo .....

Adreso .....

Telefono .....

Retadreso .....

/Siv

## Vestarkoj

**Stenegårds, Axel Ericsons, Nynäshamn, kaj London Tailor, Palladiumhuset, 1 tr.**

– tiujn mi trovis en mia vestejo... sed nuntempe oni certe ne fieras pri vestarko kun

nomo. En mia hejmo oni kolektis tiujn – same kiel oni post eksterlanda vojaĝo kolektas trovaĵojn.



*Jen vestarko de 1899  
– La Hallwylska  
muzeo, Stokholmo.*

### Pri la inventisto Johan Pettersson

La vestarko estas la plej ofta uzaĵo en svedaj hejmoj. Ĝis la fino de la 19a jarcento oni gardis vestojn kaj aliaj teksaĵojn en kestoj.

Laŭdire estis Albert Parkhouse de Usono kiu unue inventis la vestarkon el ŝtaldrato.

Sed estis la svedo Johan Pettersson, kiu konstruis la nunan vestarkhokon en la 1920a jardeko. Li metis kurbitan najlon en lignan stangeton kaj la vestarko estis inventita. Li fondis entreprenon kaj montriĝis ke estis prospera investo. (Petterssons Järnförädling AB i Hillerstorp.)



La hokoj tamen renkontas diversajn postulojn en diversaj landoj. En Azio ekz. ili devas elteni grandan humidecon.

Se vi volas vestarkon, kiu ne similas al vestarko, vi povas aĉeti "Ivy de Linked", kiu grimpas sur la vestibla vando. Paketo enhavas 16 erojn da Y-formitaj pecoj el "hedero".

/Siv




# Fama arkitekto en Gotenburgo – urbo en la okcidento



En mia librobretaro staras libro skribita de Arne Gadd kiu skribis pri Gotenburgo en olda tempo. La libro estis kristnaska donaco al mi kiam mi laboris en "Nils Einar Eriksson" arkitekta oficejo.

Mi estis desegnlernanto kaj ĉiofarulo en la oficejo. Tiam mi havis dekkvin jarojn kaj laboris de 8.00 ĝis 17.00, lunde ĝis vendrede.

Mi lernis multe dum du jaroj kaj mi renkontis Nils-Einar mem kaj liajn du gefilojn, kiuj ankaŭ estis arkitektoj, Lars-Einar kaj Kajsa. Tiam Nils-Einar estis pensiulo kaj tre fama pro siaj konstruadoj.



Sed unue eta biografio pri Nils Einar Eriksson.

Li naskiĝis la 19:an de julio 1899 en Stokholmo kaj mortis 1978 en Gotenburgo. Dum sia vivo li estis fama funkciisma arkitekto.

1975 li ricevis honoran doktorecon ĉe Chalmers teknika lernejo en Gotenburgo. Li

gajnis multajn arkitektajn konkursojn inter alie pro la Domo de Ligo de Nacioj en Ĝenevo kiu rezultis en la unua premio en 1927.

Poste mi volas prezenti konatajn domojn en Gotenburgo kiujn Nils Einar desegnis dum sia profesia laboro: */Ingegerd*



*Konserthuset 1935*



*Thulehuset 1937*





*Centrumhuset 1938*



*Västra Hamngatan 1, 1938*



*Svenska Mässan 1939*



*Götaälvbron 1939*



*Folkets Hus på Järntorget 1949*



*Park Aveny Hotel 1950*




*Guldhedens Vattentorn 1953*



*Kinejo Draken ê Järntorget kun la dancrestoracio Vågen 1956*

Mi estas fiero ke mi laboris ĉe la arkitekta oficejo. Apude mi prezentas mian unuan ateston en mia labora vivo. /*Ingegerd*



## Kantoro Gunilla – Kantor Gunilla



*Gunilla Jansson berättar:*

Det var en ung kantor i Trosa  
Som skrev både dikt och prosa  
Hon spela minsann  
Så fort som man kan  
För i elen det började osa

Så skrev min syster Siv efter ett minne, som jag berättade från min tidiga kantorstid.

Kanske inte riktigt sant – men så här var det:

JAG KOM SOM 20-åring, nyutbildad skolkantor, till Trosa. Det var en utmaning: att vara lärare för en tredjeklass på vardagarna och spela på gudstjänster, vigslar, begravningar och dop på helgerna. Dessutom hade jag ansvar för en kyrkokör och några spelelever.

Kyrkokören bestod av ett antal duktiga, trogna medlemmar. Det innebar att jag dirigerade "under körens säkra ledning" – vilket förmodligen var bäst, då kören inte gärna ville ändra sig – och jag inte var så säker på min sak att jag kunde stå på mig!

Men för att återgå till versen – en söndag fick jag höra att elen, som också orgeln drevs med, skulle stängas av kl. 12. Gudstjänsten började i vanlig tid, kl 11, och även om prästen visste om det, så predikade han ju lugnt allt som han ville ha sagt (inte helt ovanligt för präster!), så när sista psalmen och postludiet var kvar, närmade sig klockan oroväckande 12-slaget.

Alltså la jag in högsta växel och spelade så fort jag bara kunde för att undvika ett nesligt pppssssfff som avslutning på postludiet. Jag lyckades med några sekunders marginal.

Jag var ung – så när vi skulle välja ny kyrkoherde fick jag krypa till korset och bekänna: – Jag är faktiskt inte myndig! Det blev man vid 21 år då. Däremot hade man en otrolig respekt för kyrkans folk, jag minns att det fanns tanter som NEG för mig!

Även i skolan var det samma, som jag tycker nu, lite onödig respekt för läraren.

Jag tog körlektioner medan jag bodde i Trosa (fick köra upp i Nyköping). Trosa är ju inte stort, så vid ett gathörn stod två av mina elever och neg, och när jag körde om ett par hörn till stod samma flickor och neg. Detta upprepades några gånger – jag vet inte vem som tröttnade först, bilskolläraren eller flickorna!

Nåväl, det blev ju lite tröttsamt att aldrig vara ledig, varken vardag eller helg (minns inte att jag hade några lediga helger – det var inte bättre förr!) Därför la jag kantoret åt sidan och blev bara lågstadielärare, först i

MI VENIS KIEL 20-jaraĝa, novedukita lernejkantoro al Trosa, (malgranda urbo sude de Stokholmo). Vera defio esti instruisto por klaso de 9-aĝaj gelernantoj labortage kaj ludi je la diservoj, geedziĝoj, enteriĝoj kaj baptoj sanktatage. Krome mi respondecis pri preĝeĵhoroj kaj kelkaj ludlernantoj.

La preĝeĵhoroj konsistis el kelkaj spertaj, fidelaj membroj. Sekvis ke mi direktis "sub la firma gvido de la ĥoro" – kio verŝajne estis plej bone, ĉar la ĥoro ne volis ŝanĝiĝi – kaj mi ne estis tiom certa ke mi povis insisti ŝanĝon!

Sed reen al la strofo (supre) – dimanĉe mi ekaŭdis ke la elektro, per kiu ankaŭ la orgeno estis funkciigita, estos malŝaltita je la 12 h. La diservo komenciĝis kiel kutime je la 11 h. kaj eĉ ke la pastro sciis pri tio, li predikis trankvile ĉion kion vi volis diri (ne tute nekutime por pastroj)... do, kiam restis la lasta himno kaj la postludo, la tempo proksimiĝis al la 12-a horo.

Do, mi ludis je la plej ebla rapideco por eviti malgloran pppssssfff-on kiel finon de la postludo. Mi SUKCESIS kun kelkaj marĝenaj sekundoj.

Mi estis juna – do kiam ni estis elektontaj novan paroĥestron mi "iris al Kanoso" kaj konfesis: Mi fakte ne estas plenaĝa! Tiam la plenaĝo estis 25 jaroj. Kontraŭe oni havis nekredeblan respekton por la "homoj de la preĝejo", mi memoras ke troviĝis sinjorinoj kiuj riverencis al mi.

Ankaŭ en la lernejo estis la sama nenecesa respekto por la instruisto, mi nun pensas.

Mi havis aŭtokondukleciojn kiam mi loĝis en Trosa (kondukprovo en Nyköping). Trosa ne estas granda, do, en stratangulo du el miaj gelernantoj staris riverence, kaj kiam mi kondukis preter kelkaj anguloj la samaj knabinoj riverencis. Tio refariĝis kelkajn fojojn – mi ne scias, kiu unue laciĝis, la kondukinstruisto aŭ la knabinoj!

Nu, estis iomete lacige neniam esti libera, nek labortage nek sanktotage (mi ne memoras ke mi iam havis liberajn

Örebro, sedan i Göteborg. Under den här tiden gifte jag mig och fick en son.

Men så småningom fick musiken en starkare dragningskraft, så på prov tog jag tjänstledigt från lärarjobbet för en liten kantorstjänst. (Högre tjänst, fast med lägre lön! Men det var ju roligt!) Det var väl under den här tiden som min son en gång sa:

– Men mamma, du har väl inget jobb – du gillar ju att spela!

Så småningom sökte jag och fick en större tjänst: gudstjänster i två kyrkor, två vüenkörer, två barnkörer, begravningar, vigslar, dop och några spelelever.

Det var jobbiga men roliga år. Min bil gick på två hjul i kurvorna ibland på söndagsmorgonen, när den första prästen pratat för länge och jag skulle ha nästa gudstjänst och vara på alerten då.

Ja, vad ska jag berätta mer? Alla gudstjänster, vigslar, begravningar och dop kommer jag naturligtvis inte ihåg – det var när det hände något speciellt som man minns. Gråtande brudar, nervösa brudgummar som kröp på alla fyra för att leta efter den tappade ringen, eller sade: Jag NN tager dig NN nu till min extra (i st. för äkta) hustru. Det hördes kvävda skratt.

En begravning minns jag tydligt. Frun till den avlidne frågade om jag kunde tänka mig att spela Ack Värmeland du sköna, fastän den inte var ”kyrklig”. Jag sade naturligtvis Ja. Begravningen började i vanlig ordning, men när jag började spela Ack Värmeland... började alla de församlade, inklusive prästen, att gråta högt!

Jag tycker det är viktigt i musikvalet att styckena har anknytning till den avlidne – eller brudparet vid vigslar. Jag har alltid försökt att tillmötesgå sådana önskningar. Ibland har jag tyvärr fått säga nej, bl.a. för att jag inte fått tag på spelbara noter.

Det som för min del har känts mest inspirerande i mitt jobb har nog varit musikgudstjänsterna! Att själv få sätta sin prägel på gudstjänsten i samarbete med körer, sång- eller instrumentalsolisterna (och

semajnfinojn – ne estis pli bone en la malnova tempo!). Tial mi forlasis la kantorlaboron kaj nur estis instruisto en la baza lernejo- unue en Örebro, poste en Gotenburgo. Dum tiu tempo mi edziniĝis kaj naskis filon.

Sed en tiu tempo la muziko havis pli altiran forton, do prove mi ricevis liberecon de la lerneja laboro, por eta kantorlaboro. (Pli alta laboro, sed kun pli malalta salajro. Sed estis ĝoje!) Estis ja dum tiu tempo ke foje mia filo diris:

– Sed panjo, vi do ne havas laboron – vi ja **ŝatas** ludi!

Kun la tempo mi serĉis laboron, kaj ricevis pli ampleksan: diservoj en du preĝejoj, du ĥoroj por plenkreskuloj, du infanĥoroj, enterigoj, geedziĝoj, baptoj kaj kelkaj lernantoj de muzikludado.

Estis laborplenaj sed ĝojaj jaroj. Mia aŭto iris sur du radoj en la angloj foje dimanĉe matene, kiam la unua pastro parolis tro longe, kaj mi devis esti en alia preĝejo kun alia pastro kaj tiam esti vigla.

Jes, pri kio mi plu rakontu? Ĉiuj diservoj, geedziĝoj, enterigoj kaj baptoj mi kompreneble ne memoras. Estis kiam okazis iu aparta, tiam oni memoras. Plorantaj edziniĝantaj virinoj, nervozaj edziĝantoj, kiuj rampis por serĉi la falintan ringon, aŭ diris: Mi NN havas vin NN kiel mian ekstran edzinon (anstataŭ ”äkta” = laŭleĝa) edzino. Tiam aŭdiĝis subpremitaj ridoj.

Unu enterigo mi klare memoras. La edzino de la forpasinto demandis, ĉu mi emas ludi ”Vermlando vi belega”, malgraŭ ke ĝi ne estas ”preĝejo”. Mi kompreneble jesis. La enterigo komenciĝis laŭorde, sed kiam mi komencis ludi ”Vermlando vi belega” ĉiuj ĉeestantoj, inkluzive la pastro, ekis laŭte plori!

Mi pensas ke gravas ke la elekto de muziko estas ligita al la forpasinto – aŭ la paro je la geedziĝo. Mi ĉiam provis komplezi al tiaj deziroj. De tempo al tempo mi bedaŭrinde

präster) har varit mycket roligt och engagerande!

Det har varit en stor glädje att få samarbeta med hängivna, musikaliska och trevliga människor i alla åldrar!

Kanske är det vad jag saknar mest nu när jag är pensionär!

Men jag känner att jag har varit privilegierad i mitt yrke – jag har ofta tänkt på min sons ord:

”Mamma, du har väl inget jobb – du tycker ju om att spela!”

*Gunilla Jansson*

devis nei, i.a. pro tio ke mi ne trovis ludeblajn notojn.

Tio, kion miaflanke sentis plej inspiran en mia laboro estis la muzikaj diservoj! Mem doni mian stampon al la diservo kunlabore kun ĥoroj, kanto- aŭ muziksolistoj (kaj pastroj) estis tre ĝoja kaj engaĝiga!

Estis granda ĝojo kunlabori kun sindonemaj, muziktalentaj kaj agrablaj homoj je ĉiuj aĝoj!

Eble tio estas kio mankas al mi pli, kiam mi estas pensiulo!

Sed mi sentas ke mi estis privilegiita en mia posteno – mi ofte pensas pri la vortoj de mia filo:

”Panjo, vi ja ne havas laboron – vi ja **ŝatas** ludi!”

*Gunilla Jansson*

## Hemsyster – ett jobb med gamla anor



*Barbro Andersson berättar:*

♪♪♪♪♪... Jag hade en gång ett jobb, men det var så längesen, så längesen... närmare bestämt 1953.

Efter att ha jobbat inom sjukvården något år tog jag in på en ny bana. Jag började min utbildning vid Lunds hemsysterskola.

En hemsyster var kommunanställd och kom hem till familjen vid husmors sjukdom eller barnafödande, oftast i tvåveckorsperioder.

Utbildningen började i januari ena året med examen nästa år i juni. Ämnen vi läste var etik, sjukvårdslära, barnavård, mat och hälsa. Vidare huslig ekonomi, hemvård, som tvätt och klädvård samt sömnad.

Vi fick praktik inom sjukvård, på barnsjukhus, åldringsvård, BB, daghem och barnhem. Jag minns fröken Hoppe, skolkösläraryn, som hade en sidenblus, som jag skulle stryka. Siden är inte lätt att stryka. Fröken Hoppe blev inte nöjd. Jag fick stryka den igen. Fortfarande var det inte bra, så jag fick stryka den en tredje gång, innan jag fick godkänt.

Skolan hade bageri med försäljning, där fick vi jobba, när vi inte var ute på andra uppdrag. Vi lärde oss bl.a. att rulla två bullar samtidigt, en med vänster och en med höger hand.

Något av en provotid var det. Vi bodde fyra tjejer i ett litet rum med våningssängar, vi delade en liten toalett med fyra andra elever. Duscha fick vi göra i källaren.



*Hemsystrar bar förstås uniform. Jag står längst till höger.*

Disciplinen var nästan som i lumpen. En regel var att vi skulle vara inne senast klockan 10 på kvällen. Några av eleverna var i 40-årsåldern, men det var samma regler för

dem. Varje dag inleddes med morgonbön. Till uniformen hörde också vita förkläden. För att de inte skulle bli smutsiga hände det att vi hade ytterligare ett förkläde utanpå det vita.



Vår hemsysterutbildning syftade främst till att vi skulle arbeta i städer, i motsats till hemvårdarinneutbildningen, där man också lärde sig mjölka och ta hand om djur. Jag minns en elegant stadslägenhet, dit två äldre

damer just flyttat. De hade fortfarande serveringsgången full av kartonger, men gyllenladersmöblerna var praktfulla!

Så var det dags att söka arbete. På den tiden fanns det ganska så gott om arbeten att söka. Jag hamnade i en Västgötakommun bortom allfartsvägen med en hel del ålderdomliga

seder. Man hade bl.a. "kyrkotagning" – nyförlöst moder genomgår "rening" i kyrkan. Det blev att åka buss och cykel – i alla väder.

*Här följer några glimtar från den tiden:*

En höstdag ska jag infinna mig hos ett äldre syskonpar. Åker buss, som jag blivit anvisad och ska sedan bli visad väg av en grannfamilj. Jag knacker på. – "Det är 1 km genom skogen. Du får låna mina stövlar, dina skor är inte bra för den utflykten."

Kommer fram till Fridhem och till en underbar tant Augusta. Särskilt la jag märke till "guldkreolerna" i hennes öron. Senare berättade hon, att hon fått dem av en fästman, som drog till Amerika.



*Augusta och Johan*

Senare fick jag följande brev från Augusta:

En del otrevliga saker fick jag också uppleva under dessa år. Minns särskilt en barnfamilj där mamman fick gallbesvär och hamnade på sjukhem. Hon hade fem barn mellan 2 och 14 år. Där fick jag även sova över.

Så gick åren och jag blev hemmafru. Sedan skolade jag om mig för arbete i förskolan. Därifrån finns också mycket att berätta – alla dessa underbara ungar!

Men det var ju ett helt annat jobb.

*F.d. hemsyster Barbro Andersson*




*Fridhem*

Augusta behövde hjälp med sin bror, som blivit sjuk.

Jag åkte till dem varje dag några veckor. Johan blev sämre, kom till sjukhus och dog där. Augusta ville enligt gammal sed ha begravningskalas hemma. Det blev till att baka, men inte i Augustas vedspis, nej jag stannade i min lägenhet en dag och det blev några sorters småbröd minns jag.

En dag när jag kom hade Augusta nackat en höna. Den satt hon och plockade framför spisen, mitt på köksgolvet. Vi skulle ha den till middag. Minns ännu hur jobbigt det var att äta av denna höna.





# Ĝardenisto, preskaŭ la tutan vivon

## Trädgårdsmästare – nästan hela livet

*Knut Andersson rakontas:*

MITT TRÄDGÅRDSINTRESSE började då jag var 10 – 12 år.

Jag var uppväxt på en gård och fick bl.a. odla grönsaker till hushållet. Skötsel av bärbuskar ingick också, som t.ex. hallon och vinbär.

Detta var på 40-talet.

Av vår äldre granne, som också var intresserad av trädgård fick jag därför epitetet "den lille trädgårdsmästaren". Jag var med i en förening, som bl.a. anordnade tävlingar inom jord- och skogsbruk och även trädgårdsodling. Där vann jag ett och annat pris, som jag uppskattade mycket.

Jag fick arbete i en handelsträdgård, som odlade utplanteringsväxter och krukväxter för senare leverans till torget och blomsteraffärerna i staden.

Trädgårdsarbete är en trevlig sysselsättning att få ägna sig åt på heltid.

Folk frågar om det inte är risk för ryggsador, för man gräver ju mycket och lyfter en hel del.

Nej, kan man jobbet, skadas man inte. Man lär sig hur man ska göra. Många nya tar i för mycket och kan t.o.m. bryta av en spade. Det har aldrig hänt mig.

Att t.ex. forma ett fruktträd, så att det bär stor och fin frukt är en utmaning man gärna vill ha. Med speciell klippning kan man få träd och buskar att formas på olika sätt. I slottsparkar och stilträdgårdar finns

MIA INTERESO PRI ĜARDENADO ekis kiam mi havis 10–12 jarojn.

Mi elkreskis en bieno kaj mi i.a. povis kultivi legomojn por la mastrumaĵo. La laboro ankaŭ ampleksis zorgadon de berarbedoj ekz. framboj kaj riboj.

Tio okazis en la 40aj jaroj.

De nia pli maljuna najbaro, kiu ankaŭ interesiĝis pri ĝardenado, mi ricevis la epiteton "la eta ĝardenisto". Mi membris en societo, kiu i.a. aranĝis konkursojn pri agri- kaj arbarkulturo kaj ankaŭ ĝardenkulturo. Tie mi gajnis kelkajn premiojn, kiujn mi alte taksis.

Mi ricevis laboron en komerca ĝardeno, kiu kultivis kreskaĵojn por displantado kaj potplantojn por posta livero al la vendoplaco kaj al la florvendejoj en la urbo.

Ĝardenlaboro estas agrabla okupo, pri kiu mi povis labori tuttempe.

Homoj demandas ĉu (ne) estas risko ricevi dorsdifektojn, ĉar oni ja multe fosas kaj levas sufiĉe multe.

Ne, se oni konas la laboron, oni ne difektiĝas. Oni lernas kiel fari. Multaj klopodas tro kaj povas eĉ rompi fosilon. Tio neniam okazis al mi.

Formi fruktarbon, por ke ĝi portu grandajn, belajn fruktojn estas defio kiun oni volonte havas. Per speciala tondado oni povas formi arbojn kaj arbedojn diversmaniere. En palacaj parkoj kaj stilkarakteraj ĝardenoj



det olika former av buxbom och taxus, som är klippta som klot eller som låga häckar med spiraler. Mycket vanligt är att man har djur som förebilder.

Yrket har förändrats mycket under åren. Förr hackade man för hand och slog gräs med lie. Nu har man maskiner. Men det händer att jag fortfarande går ut med lien och slår vägkanterna intill vårt hus. Då är det lättare att komma åt, än med gräsklippare. Också när jag på hösten slår av perennerna använder jag lien.

Förr krattade vi ihop höstlöven. Idag blåser man bort löven med maskiner, som för väldigt oväsen.

På Kungstorget i Göteborg sålde vi julbegonior. Eftersom det tar lång tid att odla fram de vackra gammeldags blommorna, finns det knappast julbegonior att få tag i numera. Finns de, så är de i alla fall inte i klass med de gamla.

Varje år planterade vi 80 – 90 000 tulpaner och hyacinter.

Vi importerade dem från Holland. Förr sålde vi ofta tre – fem cyclamenblommor i rad med grönt omkring.

I växthusen hade vi tomatplantor, som kunde bli tre meter höga. De hölls uppe med linor. Varje vår måste man byta deras jord.

Asterplantor och violer skulle omplanteras.

Det var egentligen bara i januari som det var mindre att göra. Redan i februari kom plantor från Danmark och lökar och frön från Holland. Det var jobbigt att sedan omskola alla petunior och lobelior.

Pelargonior och begonior köpte vi sällan. Vi tog skott från stora plantor och ökade på beståndet.

Julstjärnor får som bekant inte stå i drag, så dem hade vi väl skyddade.

Med jämna mellanrum åkte vi utomlands för att se utbudet och köpa in nya växter. Min fru Barbro och vår son Anders följde då ofta med. Berlinmuren hade då ännu inte fallit och att åka in i Östtyskland

troviĝas diversaj formoj de buksoj kaj taksusoj, kiuj estas tonditaj kiel globoj aŭ kiel malaltaj heĝoj kun spiraloj. Tre kutime estas havi bestojn kiel modelojn.

La profesio multe ŝanĝiĝis kun la jaroj. Antaŭe oni hakis permane kaj tondis la herbon per falĉilo. Nun oni havas maŝinojn. Sed okazas ke mi eliras kun la falĉilo kaj tondas la vojrandojn ĉe nia domo. Tiele estas pli facile atingi la herbon ol per gazontondilo. Ankaŭ kiam mi aŭtune rompas la perenojn mi uzas la falĉilon.

Antaŭe mi kunrastis la aŭtunfoliojn. Hodiaŭ oni forblovas la foliojn per maŝinoj, kiuj tre bruas.

Sur Kungstorget (placo) en Gotenburgo ni vendis kristnaskajn begoniojn. Ĉar oni bezonas longan tempon por kultivi la belajn malnovtempajn florojn, kristnaskaj begonioj apenaŭ estas haveblaj nuntempe. Se ili troviĝas ili almenaŭ ne estas same altklasaj kiel la malnovaj.

Ĉiun jaron ni plantis 80–90 000 tulipojn kaj hiacintojn.

Ni importis ilin el Nederlando. Antaŭe ni ofte vendis tri–kvin ciklamenojn en vico kun verdaĵoj ĉirkaŭe.

En la plantodomoj ni havis tomatplantojn, kiuj povis esti tri metrojn altaj. Ili estis supre fiksitaj per ŝnuroj. Ĉiun printempon oni devis ŝanĝi ilian teron.

Plantoj de asteroj kaj violoj estis transplantitaj.

Fakte estis nur en januaro kiam estis malpli multe por fari. Jam en februaro venis plantoj el Danio kaj bulboj kaj semoj el Nederlando. Estis penige poste "reeduki" ĉiujn petuniojn kaj lobeliojn.

Pelargoniojn kaj begoniojn ni malofte aĉetis. Ni prenis ŝosojn kaj tiele grandigis la kvanton.

Kiel konate kristnaskaj eŭforbioj ne toleras stari en trablovo, do ni havis ilin bone protektitaj.

Kun regulaj intertempoj ni iris eksterlanden por spekti la ofertadon kaj aĉeti novajn

kändes äventyrligt. Hela tiden kände vi oss bevakade.

Gifter användes i trädgårdsnäringen, t.ex. för att undvika att det blir mögel på lökar eller på rosornas rötter. Var ventilationen i lokalen dålig, var arbetet där en hälsorisk.

Detta har varit mitt arbete under hela mitt yrkesverksamma liv. Nu är jag pensionär och har trädgården som hobby.

Att vara ute i trädgården är mycket rogivande och trevligt. Det har fler än jag upptäckt, så framtiden för trädgårdsnäringen ser ljus ut. Naturen betyder mycket för människans välbefinnande.

*Knut Andersson*

kreskaĵojn. Mia edzino Barbro kaj nia filo Anders tiam ofte akompanis min. La Berlinmuro ankoraŭ ne estis falinta kaj iri al Orienta Germanio sentis aventure. La tutan tempon ni sentis nin kontrolitaj.

Venenoj estis uzataj en la ĝardena komerco, ekz. por eviti ŝimaĵon sur bulboj aŭ sur la radikoj de la rozoj. Se la ventolado en la lokalo estis malbona, la laboro tie estis risiko por la sano.

Tio estis mia laboro dum tuta mia profesia laborvivo. Nun mi estas pensiulo kaj havas la ĝardenon kiel hobion. Esti ekstere en la ĝardeno estas tre ripozige kaj agrable. Tion pliaj personoj ol mi trovis, do la estonteco por la ĝarden-entrepreno ŝajnas hela. La naturo signifas multon por la bonstato de la homo.


*Knut Andersson*

## ”Elektristo” – de Lasse Granat

MIA VIZITADO al lernejo estis tro rapida kaj facila, ĉio estis amuza kaj interesa. Sed mi laciĝis de ĉio kaj mi forlasis meze en la gimnazio. Eble mi estis tro juna, ĉiuj samklasanoj estis du aŭ tri jaroj pli aĝaj ol mi.

Mi komencis labori je bierfarejo kaj veturis per trinkŝarĝaŭto de frua mateno al malfrua vespero kaj portis botelkestojn. Poste mi komencis labori je ŝipfarejo por helpi konstrui novajn ŝipojn kaj ripari ŝipojn el la tuta mondo.

Pli proksime al la aŭtuno mi ekhavis laboron je ”Kopparverket” (la kupra uzino), kemiteknika fabriko en Oskarshamn. Mi estis elektrostaĝanto. Estis la plej interesa laboro, kiun mi povis imagi, tute nova mondo. Ĉiuj plenkreskaj elektristoj bonvole instruis al mi iliajn sciojn kaj mi estis influebla. Iom post



*Pixabay – Elektristo*

iom mi ricevis pli kaj pli grandajn taskojn de konfidoj kaj kun la tempo mi faris la samajn instaladojn kaj riparadojn kiel la aliaj.

Laboro, kiun mi ofte faris, estis riparado de elektraj motoroj, ekzemple ŝanĝi karbobrosojn kaj radlagrojn. Plej ofte oni transportis ilin al la elektra laborejo, krom la plej grandajn, kiuj havis kelkajn centojn da ĉevalpovo. Ĉiuj trifazaj motoroj havas komunan kvaliton.

Kiam oni konektas ilin, ili rotacias regrese. Oni rimedis tion per interŝanĝi du el la tri fazoj. Mi kelkfoje provis konekti la kablojn kiel ili ŝajnis esti konektitaj antaŭen, sed tio malofte helpis. Unufoje elektristo ricevis malfacilan laboron, ĉar kolego staris ĉe la elektra centralo kaj interŝanĝis la kablojn je la sama takto kiel li mem, do kiel ajn li ŝanĝis la

konektojn, la motoro rotaciis regrese. Amuze, la kolego opiniis.

Estis streĉa laborejo. La grandaj produktoj estis vojsalo, vojlesivo, sulfuracido, salacido/klorida acido/ kaj globetsintro, kiuj estas elrompita ferferco prilaborita al oportuna globetformo por plua prilaborado en altfornoj kaj similaj aferoj.

La laborejo estis speciale interesa el elektra vidpunkto. Ĉiuj produktoj kaŭzis elektrajn ĝenaĵojn je la fabrikado. Altaj temperaturoj (1500 centigradoj), malseka medio, ne nur akvo sed ankaŭ vaporoj kaj gasoj, ĉio estiĝis ŝmiraĉa kaj elektre konduktita, korodinta membrano kovris ĉion. Tio postulis grandan elspezon por laborvestoj, kiujn oni disponigis al si mem, oni kunportis el la hejmo vestojn, kiuj forĵetiĝus. Unufoje mi vidis du virojn, kiuj fosis tertruon kaj estron apud ili kun kelkaj paperoj en la mano. Lia dika, nigra surtuto estis plena de truoj kaj ŝiroj, nur la kasko estis brila kaj bona. La laborantoj kontraŭe, estis elegante vestitaj. Unu havis bonan, nigran kompletan kun bluan bluzon sube, dum la alia, kiu ankaŭ havis bluan bluzon, estis vestita en ĉarma, verda frako kaj li fosis tiel ke la frakbaskoj batis kiel flugiloj.

La altaj temperaturoj estis en fornoj, grandaj kiel domoj. Estis necese teni la ĝustan temperaturon en la tuta forno. Oni devis havi termometrojn, kiuj sukcesis fari tion je kontinua funkciado dum la tuta tagnokto. Tiu estis tiel nomata pirometro kiu estis farita de du longaj fadenoj de malsimilaj metaloj kiuj troviĝis en tubo ekde la ekstera flanko de la formuro kaj ĝis konvena punkto en la forno, kie la fadenoj estis kunligitaj. Ĉiuj metaloj havas malsimilajn elektrajn kvalitojn. En la junto kie ili renkontiĝas, ekestis eta diferenco je la elektra tensio, kiu estas dependa de la temperaturo. Tial oni povas legi la temperaturon en la interna fornflanko per mezuri la elektran tension je la ekstera flanko kaj tiel direkti la nutradon.

Malseko ne bonas en elektraj medioj, estos kurentoelfluo kaj transsaltoj kaj oni ricevas elektrajn frapojn, kiam oni tuŝas objektojn, kiuj ne estus kurentkonduktaj.

Altaj elektraj tensioj oni uzis por purigi ekvaporitan sulfuracidon antaŭ ĝi kondensiĝis al fluanta formo. La vaporo preterpasis grandan kvarangulan dratreton, kiu havis surfacon de proksimume tri oble kvar metrojn. La reto havis elektran tension de kvindek mil voltoj (50000!) kontinua tensio, kiu fiksas polvopartiklojn je la reto, kiu kompreneble devas esti purigita intervale.

La purigisto ricevas la ŝlosilon de tiu ĉambro, kiu ĉiam estas ŝlosita. Ekster la pordo situas grandaj ŝaltilŝrankoj kun tre grandaj manovrostangoj. Kiam oni deŝaltas oni alpendigas ŝildon kun la teksto "laboro okazas". Kiam oni malŝlosis kaj eniris la ĉambron, oni unue devas preni terkonduktilon je longa izolita stango kaj aliro ĝin al la dratreto elektra konekto. Poste oni povas komenci labori. Kiam la laboro estas preta oni faras ĉion laŭ inversa vico. Foje ankaŭ elektristoj devas eniri tien por riparadoj aŭ bontenadoj kaj faras tiam sammaniere kiel la purigisto.

Foje elektristo eniris tuj post kiam la purigisto eliris. La elektristo deŝaltis la fluon, malŝlosis la pordon kaj eniris por aliro ĝin al terkonduktilon. Samtempe la purigisto preterpasis la ŝaltilŝrankon kaj vidis ke la fluo estis malkonektita. Li supozis ke li forgesis konekti la fluon, do li forprenis la ŝildon kaj ektuŝis la ŝaltilon. La elektristo tiam tenis la terkonduktilon kelkajn decimetrojn de la konduktilo. Estis kiel fulmobato kun krako kaj siblanta fajreropluko en la tuta ĉambro. La elektristo kompreneble ricevis parteto de fluo malgraŭ la longa izolita stango, sed en la malsanulejo oni observis ke li estis preskaŭ senleza. Poste oni surmetis seruron ankaŭ sur la ŝaltilŝrankojn.

En la sulfuracidofabriko ankaŭ troviĝis aliaj objektoj kun nesufiĉaj ŝirmiloj. La acido

kuniĝis en grandaj cisterno, kvin aŭ ses metrojn altajn kun ŝtupetaro flanken kaj mallarĝa vojeto supren ĉirkaŭe de la tuta cisterno. La vojeto havis parapeton je la ekstera flanko por ke oni ne subfalu kaj vundu sin. En la interna flanko ne estis parapeton, do tie foje viro subfalas. En la 98-gradan sulfuracidon. La cisterno malpleniĝis kiel eble plej baldaŭ. Sur la fundo oni trovis oran edziĝoringon kaj du orajn dentojn. Poste

oni surmetis parapeton ankaŭ sur la interna flanko de la vojeto.

Je la printempo la laborestro diris al mi ke "vi ne devas esti ĉi tie kiel elektristo, vi devas esti inĝeniero kaj vi devas studi komputilan teknikon!". Do mi faris tiel, kiel mia laborestro ordonis. Oni ĉiam devas fari tiel.

/Lasse Granat

## Unuoj kaj nuloj – mia granda intereso!

### Ettor och nollor – mitt stora intresse!

*Magnus Löndén donas al ni rakonton el la infaneco de la komputilo.*



Under min uppväxt har jag alltid varit intresserad av teknik. Jag brukade sitta hemma i vår lilla verkstad i källaren och bygga bilmodeller och löda ihop radiokretsar. Mina föräldrar fordrade att jag gjorde mina läxor. Detta är jag tacksam för idag. Matematik-kunskap har givet mig mycket glädje och gjort det möjligt för mig att klara av många av de jobb jag har gett mig an. Att lösa problem på ett logiskt sätt gav mig tillfredsställelse. Detta ledde till att

